

& Gaudeamus - Studenta himno:

< Ripete 18 el 61 batoj por strofo, entute 427 paŝoj dum 3 minutoj. El latina tradukis L. Zamenhof. La kutima latina titolo estas "Gaudeamus igitur". >

(#Melodio:

(

/do3So So do /La3La La La /Ti3do re Ti /dolmi do o)×

(/Ti3do re re /mi3do re re)×

/doTi Lalfa milre /mi lre ddo /doTi Lalfa milre /so lTi ddo h

)×7)+

(& Strofoj:

'1 /Ĝoju, ĝoju /ni, kolegoj, /dum ni junaj /e2stas! /Ĝoju, ĝoju /ni, kolegoj, /dum ni junaj /e2stas! /Post plezura /estanteco, /post malgaja /maljuneco /Sole te2ro2 /re2stos, /sole te2ro2 /re2stos.

'2 (Vivo estas tre mallonga, kuras ne tenate.)× Kaj subite morto venos, kaj rapide ĉiun prenos, (Ĉiun senkompate.)×

'3 (Kie niaj antaŭuloj en la mondo sidas?)× Iru al la superuloj, serĉu ilin ĉe subuloj, (Kiu ilin vidas?)×

'4 (Vivu la Akademio, kaj la profesoroj!)× Vivu longe, kaj en sano, ĉiu akademiano, (Vivu sen doloroj.)×

'5 (Vivu ĉiuj la knabinoj belaj kaj hontemaj!)× Vivu ankaŭ la virinoj, amikinoj kaj mastrinoj, (Bonaj laboremaj.)×

'6 (Vivu, floru nia regno kaj regnestro nia)× Kaj amikoj mecenataj, protektantoj estimataj (De l' akademio.)×

'7 (Mortu, mortu, malgajeco, mortu la doloro!)× Mortu ĉiu intriganto, kaj malamon konservanto (Longe en la koro.)×